


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



Unu el la plej belaj lokoj de „Mondaj Heredaĵoj”
en Hungario: La vilaĝo Hollókő

4
----- 58-a jarkolekto
2014



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

.....
Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapest

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok

központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

.....
ISSN 0230-323x
.....

ENHAVTABELO:

62. I. Gulyás: Taksado
63. I. Gulyás: Estrarkunsido de IFEF
en Ĉeĥio
69. I. Gulyás: Translokiĝo
72. I. Gulyás: Mondaj Heredaĵoj
en Hungario
76. La Red.: Mesaĝo de Unesko
77. J. Tomísek: El fervoja mondo

TAKSADO

Denove alproksimiĝas la fino de la jaro. La taksadon de la laboro de nia Asocio okazos en la ĝenerala kunveno en la fino de januaro 2015. Tamen mi ŝatus mencii kelkajn gravajn temojn, kiuj plibonigis nian prijuĝon en la Esperanto-medio, kaj kelkajn malbonajn eventojn.

Nia asocio agadas laŭ la aprobitaj laborplanoj, do ni havas gvidfadenon por akurate kaj sisteme labori. Tiu laborplano alĝustiĝas al la agadplano de IFEF. Laŭ tiu plano nia Asocio partoprenas en la laboroj de la nova IFEF-laborgrupoj kiel la laborgrupoj pri statuto, pri instruado, pri eksteraj rilatoj de IFEF, pri rilatoj interne de IFEF, pri historio kaj arkivo de IFEF, pri modernigo de informado en nuna reta epoko, pri financado de projektoj, eĉ en la laboroj de la Faka- kaj la Redaktora Komisionoj de IFEF. Tiuj laborgrupoj kaj komisionoj estas destinitaj por plibonigi la fervojistan Esperanto-agadon. Ankaŭ nia Asocio devas sisteme kaj entuziasme labori, kaj precize difini la plenumitajn taskojn en la jaro 2015. Mi esperas, ke tiuj vortoj ne estas nur vakaj kaj senvaloraj rimarkoj, kaj ne nur kelkaj hungaraj fervojistaj esperantistoj laboras por atingi la celojn. Ni rajtas ĝoji pro la bonsukcesa Landa Amika Renkontiĝo en la urbo Győr, pro la inda soleno de la Zamenhof-tago, pro la klubkunvenoj kaj aliaj eventoj. Okazis ŝanĝo de nia E-vivo, ĉar nia Asocio translokiĝis en alia konstruaĵo. Pri tiu evento vi povas legi en ĉi tiu numero de HFM.

Malbona afero estas, ke nia nemalhavebla membro kaj amiko János Patay jam dum kvar monatoj estas en hospitalo pro grava malsano. Bedaŭrinde sen li la skribadon kaj redaktadon de nia faka revuo HFM, eĉ la internacia revuo IF ni povas solvi kun granda malfacilaĵo. Ankaŭ estas signifa problemo, ke rapide maljuniĝas nia membraro. Antaŭ kelkaj semajnoj mi ricevis sciigon pri la ĉeso de la Fakgrupo Debrecen en la fino de la nuna jaro pro manko de fervojistaj esperantistoj. Mi esperas, ke laŭ la raportoj de la fakgrupoj kaj la membroasocioj mi povos taksi nian ĉijaran agadon pli pozitive.

István Gulyás

58-a jaro N-ro 4. OKTOBRO-DECEMBRO

ESTRARKUNSIDO DE IFEF EN ĈEĤIO

La aŭtuna estrarkunsido de IFEF okazis neregularan manieron. La unua parto de la estrarkunsido okazis en la urbeto Chodov inter la 7-a kaj 9-a de novembro 2014, kaj la duan parton oni organizis en la ĉeĥa ĉefurbo Prago.

La **urbeto Chodov** situas en la nordokcidenta parto de Ĉeĥio, malproksime al la landlimo de Germanio. Unuaj skribaj informoj pri la urbeto estas dokumentitaj el la fino de la 12-a jarcento. Grava tempolimo de



La preĝejo de la urbo Chodov

la ekonomia kaj la socia signifo fariĝis la rangaltigo de Chodov fare de la imperiestro Jozefo Francisko la 1-a, kiel urbo per dekreto de 30-a de septembro 1894. Sekve la imperiestro honorigis la urbeton per urba blazono, kiu simbolas aktivecojn tiutempe tipajn produktadojn de porcelanaĵoj, minejelfosadon de karbo, ekspluatadon de fervojo kaj agrikulturon.

La nuna urbeto Chodov havas pr. 15.000 loĝantojn. La historia centro de la urbeto post vasta rekonstruado estas agrabla loko por renkontiĝoj kun vico da kulturaj aranĝoj, por promenado kaj ripozo. Dominanto de la urbeto estas la baroka preĝejo de Sankta Laŭrenco, konstruita en la jaroj 1725-1733, en kies proksimo troveblas Kalvaria kolono, malfrue renesanca plastikaĵo el la jaro 1672, kaj la statuo de Sankta Sebastiano el la duono de la 18-a jarcento. Interesa estas ankoraŭ la Kolono de Maria el la jaro 1675

en la Malnovurba strato, la Memormonumento al la viktimoj dum la militoj, la Gongoj de la origina turhorloĝo de la preĝejo fare en 1878, kaj la urba Biblioteko, konstruita en 1911. Ĝustadire en Chodov okazis la **jarkonferenco** de la ĉeĥaj fervojistaj esperantistoj, kaj nur unu temon ni traktis tie en la kadro de la **estrarkunsido** de IFEF. Tiu temo estis la agadplano de IFEF, en kies kadro la estraro aŭskultis la raportojn de kelkaj gvidantoj de la laborgrupoj, kaj decidis pri la pluaj farenadaĵoj. Dum la jarkonferenco la estraranoj de IFEF parolis pri la movada situacio de IFEF, pri la laborplano, pri tiuj taskoj, kiuj helpas renovigi la vidmanieron kaj perspektivon de la labormetodo de la estraro, de la komitato, eĉ de la landaj asocioj. La ĉeĥaj partoprenantoj de la konferenco parolis pri la plibonigo de la movada laboro, pri la pligrandigo de la lingvoscio, pri la ebleco de la altigo de la membronombro. Estis interesa kaj instruaja konferenco.

La estraranoj havis eblecon dufoje – vespere kaj antaŭtagmeze - viziti la mondfaman **urbon Karlovy Vary**, kiu situas pr. 15 km-ojn de la urbeto Chodov. Tio estas distrikta urbo en okcidenta Bohemio, kunfluejo de la riveroj Ohre kaj Teplá. Laŭ la postrestaj skribadoj kaj la buŝa tradicio en la jaro 1350 la imperiestro Karel IV dum la restado en sia reĝa kastelo en Loket organizis ĉasiron en la ĉirkaŭaj arbaroj. Li trovis fonton kun varma akvo, kiun li nomis „Varmega banejo apud Loket”, pli poste alnomita al Karlovy Vary. En la jaro 1370 Karel IV ordenis al la banejo urbajn rajtojn, la samajn kiel la urbo Loket. En 1522 aperis la unuan fakan libron pri la urbo kaj pri la ĉirkaŭaj kuracefikaj ŝprucfontoj. Sesdek jarojn poste trafis la urbon granda superakvego, kaj en 1604 okazis katastrofa brulego, kiu tute detruis la urbon.

Simile okazis en 1759. Poste komenciĝis la konstruadoj de hoteloj, eĉ en 1807 en la

urbo komencis produktado de likvoro „Becherovka”, kiu en sekvaj jaroj famiĝis ne nur en Bohemio, sed ankaŭ en la mondo. En 1844 komencas evolui industrio, celante eksporton de mineralakvo. La evoluo de la urbo bezonis kunligon al fervojo, kaj en la jaro 1870 la urbo estis alligita al eŭropa fervoja reto. Fine de la 19-a jarcento Karlovy Vary transformiĝis ankaŭ arkitekture. Oni preferis la historiajn stilojn (novklasika, novbaroka kaj novrenesanca) de la konstruaĵoj. En la jaro 1929 en la urbo estis malfermita la „Flughaveno Karlovy Vary”, kaj en 1946 estis fondita „Internacia filmfestivalo de Karlovy Vary”, kiu famigis la urbon en la tuta mondo.

Lokaj banejoj uzas mineralakvon kun kuracefikon, aperanta en granita kristaltavolo en profundo ĉ. 2000 metrojn. Tiu kuracakvo bonefikas en la kuracado de hepataj kaj internaj korpmalsanoj de stomako kaj hepato. Antaŭ kelkdek jaroj ankoraŭ pli ol cent fontoj funkciis, sed intertempe kelkaj kuracefikaj fontoj elsekiĝis. Momente 79 mineralakvaj ŝprucfontoj ekzistas, kaj multaj el ili estas uzataj por trinkkuracado. En la urbo troviĝas kvin kolonaroj. La mineralakvo nuntempe multe kontribuas por la urbaj monelspezoj, kaj la urbo klopodas protekti tiun.



En la fervoja muzeo de Kraslice

La estraranoj de IFEF, helpe de Ladislav Kovar kaj edzino, travizitis la urbon kaj dumtage, kaj vespere. Ni admiris la belegajn kaj bonstatajn konstruaĵojn, la bele flegitajn parkojn, en kiuj en flavaj, ruĝaj, verdaj koloroj pompadas la arboj kaj arbustoj. Ni vizitis la kolonhalojn, en kiuj

multaj homoj trinkis la mineralakvon el specialaj trinkpotetoj. Ankaŭ vespere ni promenadis en la urbo, kie multaj homoj rigardis la bele lumigitajn konstruaĵojn, stratojn, vendejojn, eĉ la tutan urbon. Belegaj ekskursoj estis.

La alia ekskurso okazis al la **urbeto Kraslice**, kiu situas apud la landlimo de Germanio, kaj kie ni vizitis la Fervojmuzeon. La historio de tiu muzeo



Antaŭ la stacidomo Kraslice

estas interese. Pli ol dek jaroj ekzistis fervoja ekspozicio en la stacidomo Klingenthal (germana landlima urbeto), kies establinto estis loka fervojamika societo. Tiu konstanta ekspozicio, direktiĝanta plejparte al la historio kaj evoluo de la fervojlinioj en la regiono Vogtland, estis konata ne nur en Germanio, sed ankaŭ en la Ĉeĥa Respubliko, precipe post la malfermo de la fervoja enir-ejo el Kraslice. En kelkaj ĉambroj estis kolektitaj tridimensiaj objektoj, planoj, fotografaĵoj kaj aliaj dokumentoj pri fervojlinioj sur la ĉeĥa kaj saksa flankoj de la ŝtata landlimo. Ĉar la Germana Fervojo preparis vendon de vasta objekto de la stacidomo en Klingenthal, germanaj kolegoj estis devigitaj serĉi novan lokon por la ekspozicio. Parton de la ekspoziciaĵoj ili sukcesis transloki en la stacidomon de la proksima Schöneck, alia parto estis enlokita en Kraslice, kie ĝi troviĝas spacojn de iama fervoja restoracio. La ekspoziciatajn objektojn senpage pruntedonis Germanio, kiun kompletigis la Ĉeĥaj Fervojoj, la akcia

kompanio Viamont kaj privataj posedantoj. La objektoj en la muzeo havas bonan staton, eĉ multaj el ili ankoraŭ funkcias. La muzeo



Dum la promenado ni manĝis biskvitojn

ankaŭ estas dokumentara centro. Je dispono estas literaturo kaj aliaj printaĵoj pri historio ne nur de la fervojlinio el Sokolov al Klingenthal, sed ankaŭ pri aliaj fervojlinioj en la regiono. Estas interesa, ke la fervojlinio inter Sokolov kaj Klingenthal en la jaro 1998 estis ludonita al la kompanio Viamont, kiu en la sama jaro refunkciigis la trafikon al Hraničná. Post la rekonstruo de la translima parto de la linio, kaj la konstruo de mankanta ponto en la saksa teritorio, en la fino de majo 2000 estis refunkciigita ankaŭ internacia trafiko al Germanio. La kompanio enkondukis sur la linio simpligitan trajnsekurigon kaj pligrandigis la rapidecon de la trajnoj.

La estraranoj de IFEF per buseto kaj aŭtomobilo veturis vendrede posttagmeze al Prago. Post la komuna vespermanĝo - per la gvidado de Anna Abelovska - ni longe promenadis en la vespera, kaj bele lumigita Prago, kaj ni rigardis la tutan malnovan urboparton, la Karlo-Ponton sur la rivero Vltava, la faman horloĝon „Orloj”, la plej grandan placon Vencesla k.a. Estis tre interesa, ke preskaŭ noktmeze multaj homoj - ĉefe turistoj - promenadis sur la stratoj.

Mi jam plurfoje skribis pri la ĉefurbo de la Ĉeĥa Respubliko **Prago** en nia revuo, pro tio mi mencias nur kelkajn frazojn pri tiu belega „Ora Prago”. La plej vizitata vidindaĵo estas la „Karlo-Ponto”, kiu konstruiĝis en 1357. Sur la ponto veturiloj ne rajtas trafiki, kaj ĝi dum multaj jarcentoj gardas la riveron Vltava. La alia impona vidindaĵo estas la fortikaĵo „Hradčany” kun la katedralo „Sankta Vito” kaj kun la „Ora Strateto”. La plej vizitataj

vidindaĵoj estas la „Malnovurba Placo” kun la preĝejoj de „Sankta Nikolao” kaj „Maria Tyn”, eĉ kun la unika astronomia horloĝo „Orloj”, kies kreanton - laŭ la legendo - oni blindigis por ke li ne povu krei similan horloĝon. En ĉiu horo la astronomia horloĝo ludas interesan programon, kiam en la fenestro aperas apostoloj, skeletulo sonorigas, virkoko kokerikas, kaj ĉion finis viva trumpisto en historia vesto staranta supre en la tura belvidejo.

En tiu ĉi placo oni povas vidi la naskiĝdomon de „Franz Kafka” kaj la monumenton „Johano Hus”. Mi mencias ankoraŭ la „Venceslan Placon” kun la „Nacia Muzeo”, kie multaj revoluciaj eventoj okazis dum jarcentoj. Ankaŭ estas unika vidindaĵo la „Juda Kvartalo” kun sinagogoj, kaj kun la malnova juda tombejo, la baziliko „Sankta Petro kaj Paŭlo”, eĉ pli ol 100 preĝejoj kaj aliaj ekleziaj konstruaĵoj. Tiuj formas la ĉeftrezoron de Prago. La ĉefurbo estas magia kaj interesa, fiera pri sia riĉa historio, kaj preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj fabelas pri la pasinteco ĉefe en la malnova urboparto. Do Prago estas belega, kaj ĝi estas inda kaj merita por viziti tiun.



Biertrinkado en Karlovy Vary

Mi ŝatus skribi pri miaj spertoj pri **la pragaj bierejoj**. Mi ne ŝatus la alkoholaĵojn, sed la biero estas escepto. Kompreneble mi trinkas nur modeste kaj malmulte, tamen mi havas multajn travivaĵojn kadre de la biertrinkado en Prago. La mondnivelaj markoj de la pragaj bieroj estas la Staropramen, la Pilsner Urquell, la Budvar, la Gambrinus, la Kozel, la Krušovice, la Radegast ktp, do mi ankoraŭ povus vicigi la delikatajn bierojn. La historio de la bierfarejo rerigardas kaj rekondukas ĝis la antikvaj

Egiptio kaj Babilono. En la mezepoka Eŭropo la monaĥoj brasis la bieron (Belgio ankoraŭ nuntempe havas ekzemplon helpe de la biero „Trapist“). En Ĉeĥio pilsenaj „fakuloj“ en la 13-a jarcento ricevis permeson de la reĝo Vencesla la dua por brasi bieron. Laŭ la statistikoj ĉiuj ĉeĥaj civitanoj meznombro 165 litrojn da biero trinkas poĵare. Tiu statistika cifero montras, ke la ĉeĥoj estas la unuaj en Eŭropo, eĉ



Sur la kolonaro en Karlovy Vary

en la mondo por la biertrinkado. En Francio la vino, en Ĉeĥio la biero (pivo, flua pano) estas la akcesoraĵo de la komuna kontakto.

Okaze de ĉiuj vizitoj en Prago miaj geamikoj akompanis min al pluraj bierejoj. Mi jam vizitis helpe de miaj UIC-amikoj unu el la plej famaj bierejoj la „Oran Tigron“ (U Zlatého Tigra), kie la fama verkisto Bohumil Hrabal trinkis la bieron, kaj verkis mondfamajn romanojn. Sur la muroj nenombreblaj memoraĵoj, ĉefe fotoj videblas, inter ili komuna foto pri Hrabal kaj Bill Clinton usonana prezidento.

La alia „kara“ bierejo estas laŭ miaj ĈD-amikoj la „Kaliko“ (U Kalicha), kie estis regula gasto Jaroslav Hašek, kiu verkis la faman romanon „Svejk la brava soldato“. Mi bone memoras, ke je la unua fojo ni ne sukcesis eniri tien pro la multaj, ĉefe eksterlandaj gastoj, sed la posedanto de la bierejo promesis, ke en la sekva vespero ni havos rajton eniri. Vere okazis tio, kaj ni ensidis inter la gajajn gastojn por vespermanĝi kaj trinki la bongustan bieron „Pilsner Urquell“.

La sekva haltejo estis - ankoraŭ en la jaro 2008 dum la ĉeĥa jarkunsido – la fama bierfarejo kaj trinkejo „U Fleku“, kien akompanis min A. Abelovská, J. Tomíšek, L. Láni kaj L. Patek. Ni trinkis bongustan 13 gradan malhelan (nigran) bieron, produktitan

en propra bierfarejo, kies sekreto oni timige gardas. Dum la bonhumora kaj agrabla restado ni ĝuis la konvenan muzikon per akordiono kaj trumpeto.

Mi ankoraŭ vizitis la bierejon „Blu Kato“ en la strato Sankta Bartolomeo, kaj la „Domon de la Bierfarejoj“ kaj aliaj intimaj, malgrandaj bierejoj.

Okaze de la nuna estrarkunsido de IFEF en Prago, ni vizitis la interesan bierejon eĉ restoracion „Vytopna“ (Remiza Hejtejo). En tiu restoracio al ĉiuj tabloj kondukas malgrandaj relparoj, sur kiuj trafikis modelfervojoj lokomotivoj kaj kelkaj ŝarĝvagonoj, en kiuj la kelneroj sendas la bierojn kaj aliajn trinkaĵojn al la gastoj. Poste la modelfervojo forveturigas la malplenajn glasojn. La manĝojn mem alportas kelneroj. Ni trinkis nigran bieron „Krušovice“, kaj ni ĝuis la interesan etoson.

Mi povas konstati, ke Prago estas la paca ĉefurbo de la bierkulturo.



Ĉu post tiu „kara temo“ mi rajtas skribi pri la estrarkunsido de IFEF? Mi pensas, ke mallonge jes!

La **estrarkunsido** okazis en la stacidomo „Masarikovo“. Ĉar multaj gravaj kaj tiklaj temoj rolis inter la tagordoj de la estrarkunsido, la estraro lunde la 10-an de novembro 2014 dum la tuta tago traktis kaj faris decidojn. Dum la estrarkunsido partoprenis kvar estraranoj, la ĉefkomitatano, Anna Abelovská, Jean Ripoĉe, kaj parte Bodo Ehrliĉ kaj Heinz Hoffmann el Germanio, Ladislav Hakl kaj Ladislav Kovár el Ĉeĥio. Bedaŭrinde pro familiaj kaŭzoj mankas la vicprezidantino Sylviane Lafargue.



Babilado en iu restoracio en Prago

La estraro ekzamenis la situacion de la preparlaboro de la 67-a IFEF-kongreso, okazonta en Ĉinio, kaj konstatis, ke devas fari kelkajn ŝanĝojn en la programo. La redaktoro de IF atendas detalan informon pri la postkongreso. Estas grava temo, ĉu la komitato havos kvorumon dum la komitatkunsidoj en la 67-a IFK? Laŭ la decido de la komitato en la 66-a IFEF-kongreso estas la jena: „La minimuma nombro de membroj por starigi landan asocion estas 5. Landa asocio kun 10 ĝis 40 membroj rajtas delegi unu komitatano, kaj unu plian por ĉiu komencita 40, maksimume kvin komitatanojn”. Se ni kalkulas la nombrojn de la landaj asocioj, kaj ni kalkulas kun tiuj komitatanoj, kiuj verŝajne partoprenos en la 67-a kongreso, ni esperas, ke la komitato estos decidkapabla.

La alia grava temo estis helpi la organizadon de la 68-a IFEF-kongreso, okazonta en bulgara urbo Blagojevgrad. La problemoj en la 62-a IFK, kiu ankaŭ okazis en Bulgario, servu al ni kiel leciono. Pri tiuj problemoj (hotelkostoj, ekskursoj, lingvaj problemoj k.a.) mi detale skribis tiam en nia faka revuo „Internacia Fervojisto”, eĉ en HFM. Do la estraro devas helpi al la LKK-anoj de tiu kongreso, kaj atentigi ilin pri la eraraj decidoj. La 69-a IFEF-kongreson la kubaj esperantistoj planas organizi en 2017. Tiu propono havas kelkajn problemojn:

- du jaroj post la kongreso en Ĉinio ne estus bona afero denove organizi kongreson ekster Eŭropo;

- la kubaj fervojistaj esperantistoj ankoraŭ ne havas sperton por organizi kongreson, do ili devus partopreni kelkajn

IFEF-kongresojn, kaj akiri spertojn antaŭ ol ili organizus kongreson;

- ankaŭ la financaj malfacilaĵoj donus malfacile solveblajn problemojn.

Do la estraranoj proponis, ke post kelkaj jaroj – eble en la fino de ĉi tiu jardeko – organizu IFEF-kongreson Kubo, sed tamen la temon ankoraŭ devas flue ekzameni.

La estraro detale analizis la redakciajn aferojn, ĉar la kvarmembra Redaktora Komisiono de IFEF apenaŭ funkcias, ja mortis Jozefo Cziboly, kaj jam pli ol tri monatoj János Patay estas en hospitalo pro gravaj malsanoj. Ankaŭ estas „eterna” problemo, ke la IFEF-membroj ne aŭ apenaŭ sendas artikolojn por IF. La plua problemo estas la pres- kaj sendokostoj de nia revuo. Pro tio la estraro instigis la landajn asociojn, por ke ili petu la IF-on elektronike. Por la malpliigo de la kostoj, en la lasta kongreso la komitato akceptis la proponon de la estraro, ke estu du diversaj jarkotizoj. Laŭ tiu propono tiuj membroj, kiuj petas la IF-on papere, pagu 15 Eŭrojn, kiuj akceptas la IF-on elektronike pagu 9 Eŭrojn po jare. Ĝis nun jam venis proponojn, laŭ tiuj multaj landaj asocioj akceptas elektronike la IF-on.

La financaj problemoj de IFEF espereble solviĝos per tiu praktiko, eĉ IFEF povos finance helpi al kubanoj por organizi kongreson.

Inter la eksteraj rilatoj estas novaĵo, ke pro familiaj kaŭzoj la vicprezidantino devis rezigni la postenon „Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA”. Ŝi jam ne povis partopreni en la Universalaj Kongresoj en Vjetnamio kaj Argentino. Mi ege bedaŭras tion, ĉar mi plenigis tiun postenon pli ol 30 jaroj, kaj mi partoprenis en ĉiuj UK-oj en tiu periodo, kaj nia Federacio akiris bonan reputacion ĉe UEA pro la regule organizado de fervojista kontaktkuveno dum la kongresoj, pro la aktiveco dum la komitatkunsidoj kaj aliaj kongresaj eventoj ktp. Mi esperas, ke IFEF trovos taŭgan

fervojistan esperantiston, kiu digne daŭrigos tiun agadon.

Estas malbona afero, ke la interrilato kun FISAIC ne pliboniĝis. La diversajn proponojn de IFEF, la membroj de la Ĝenerala Asembleo akceptis ne tro grava intereso. Mi esperas, ke helpe de la franca, germana kaj ĉeĥa delegitoj, IFEF denove rolas elstare en la kadro de FISAIC, eĉ nia Federacio povos partopreni en la projekto pri financado pere de Eŭropa Unio.



La trajneto kunportas la bieron

Estas granda sukceso, ke la renovigita „Kunlabora Interkonsento” kun la medicinistoj (UMEA) estis aprobita kaj subskribita fare de la du prezidantoj, kaj laŭ tio la ekzemplodona kunlaboro daŭrigos. Ankaŭ daŭrigas la kunlaboro kun la instruistoj (ILEI). La kunlaboro kun la sciencistoj (ISAE) pro la morto de la antaŭa prezidanto ne funkcias. Mi esperas, ke la nova prezidanto de ISAE – José Antonio Vergara – apogos la kunlaboron inter la du asocioj.

Dum la estrarkunsido la plej tikla temo estis la agadplano, kaj la situacio kaj estonto de IFEF. Tiun tagordon jam en Ĉhodov traktis la estraro, kaj en Prago denove trarigardis tiun. Laŭ la decidita programo entute du komisionoj agadas sur tiu tereno, kaj 7 laborgrupoj establiĝis por plibonigi la agadon de IFEF. Tiuj estas: Faka Komisiono: gv. Jan Niemann; Redaktora Komisiono: gv. István Gulyás; Laborgrupo pri Statuto: resp. Romano Bolognesi; Laborgrupo pri instruado: resp. Rodica Todor; Laborgrupo pri eksteraj rialtoj de

IFEF: resp. Rodica Todor; Laborgrupo pri rilatoj interne de IFEF: resp. Jindrich Tomisek; Laborgrupo pri historio kaj arkivo de IFEF resp. Jan Niemann;



En la restoracio Vytopna

Laborgrupo pri modernigo de informado en la nuna reta epoko: resp. Ladislav Hakl; Laborgrupo pri financado de projektoj: resp. Ladislav Kovár. Ĉiu Komisiono kaj Laborgrupo havas kelkajn kunlaborantojn el la landaj asocioj. La estraro de IFEF esperas bonajn kaj verajn rezultojn de tiuj Komisionoj kaj Laborgrupoj. La estraro determinis la konkretajn kaj plenumitajn taskojn, kiuj kongruas kun la Statuto de IFEF, la difinitajn limdatojn kaj rimedojn por kunlabori.

Fine la estraro decidis pri la loko kaj la dato de la printempa estrarkunsido. Laŭ la invito de la Franca Fervojista Esperanto-Asocio tiu okazos en la franca urbo Dijon kadre de la Franca Fervojista Esperanto-Kongreso inter la 11-a kaj 14-a de aprilo 2015.

Mi dankas al la ĉeĥaj fervojistaj esperantistoj, ĉefe al Anna Abelovská, Jindrich Tomisek, kaj Ladislav Kovár tiujn belegajn tagojn en Ĉeĥio, la taŭgajn cirkonstancojn por kunsidi, la zorgadon por tranokti, ekskursi, veturi, manĝi kaj ĝui la amikan etoson.

István Gulyás

TRANSLOKIĜO

En Hungario oni diras, ke „Transloĝi estas ruiniĝo”. Mi spertis, ke tiu frazeologia esprimo enhavas veron. Verdire mia familio jam antaŭ kvardek jaroj faris translokiĝon, sed tamen en la nuna jaro ni devis sperti la malfacilaĵojn de la translokiĝo. Nome okazis malbona evento, kiam en somero mi – kiel la prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio-- ricevis



Mia edzino elektadas la librojn

alvokon, ke post kelkaj semajnoj nia Asocio devas forlasi nian rezidejon en la strato Benczur de Budapeŝto. Dank' al Dio, ke ni devis translokiĝi kune kun VOKE kaj la Fervojista Muziklernejo, kiuj ankaŭ havis lokon en sama konstruaĵo. Kiam oni montris al mi la novan rezidejon – kiu troveblas pro 500 metrojn de la malnova rezidejo – mia timo forpasis, ĉar mi konstatis, ke la nova loko estas taŭga kaj konvena por nia Asocio, sed la nova ĉambro havas pli malgrandan spacon por meti niajn ŝrankojn, skribotablojn kaj aliajn aĵojn. Pro tio ni devis ordigi, disŝuti kaj elektadi ĉefe en niaj bibliotekoj kaj ceteraj paperaĵoj, kaj poste meti ilin en grandajn skatolojn.

Mi pensis, ke el niaj membroj kelkaj fervojistaj esperantistoj helpas paki kaj ordigi la librojn kaj aliajn paperaĵojn. Tio restis revo, ĉar bedaŭrinde neniu venis helpi, pro tio mia edzino kaj mi devis fari tiun temporaban laboron, kiun ni faris dum unu monato preskaŭ ĉiutage.

Nia biblioteko havis pli ol dumil, ĉefe esperantlingvajn librojn. Inter tiuj troveblas multaj interesaj beletristaj, movadaj, historiaj kaj geografiaj libroj, diversaj vortaroj, lernolibroj kaj multaj hungarlingvaj libroj. Multajn spacojn bezonas la binditajn revuojn, kaj la revuoj Esperanto, Hungara Fervojista Mondo, kaj Internacia Fervojisto, kiuj ankoraŭ ne estas binditaj. Do ni devis ĉiujn librojn trarigardi kaj elektadi tiujn, kiujn ni forĵetis, Tiel nia biblioteko nun havas pro dumil ekzemplerojn, kiujn ni ankoraŭ devos precize katalogi.

Ni havis multajn financajn, movadajn kaj aliajn paperaĵojn, el kiuj jam multaj ne estas aktualaj, do ni devis tiujn trasarki. Imagu, ke ĉiujn paperaĵojn ni devis rigardi, eĉ tralegi, kaj poste decidi pri la selekto. Tio estis la vera temporaba laboro.



Mi elektadas la paperaĵojn

Malgraŭ la multaj laboroj kaj malfacilaĵoj la translokiĝo donis al mi multajn ĝojojn, interesajn travivaĵojn kaj spertojn. Mi vidis, ke inter la libroj – kiujn verkis eksterlandaj verkistoj - estas valoraj ekzempleroj de L. Zamenhof, H. Hodler, G. Waringhien, B. Ragnarsson, E. Privat, T. Sekelj, R. Schwartz, M. Boulton, E. Wüster, R. Dobrzynski, J. Giessner, H. Tonkin, W. Auld, k.a. En multaj libroj mi trovis dediĉojn por niaj antaŭuloj, ĉefe por D-ro István Bácskai. Ankaŭ estis interesaj kaj utilaj spertoj trafoliumi tiujn librojn, kiujn verkis hungaroj. Ni havas la tutaj verkoj de J. Baghy, preskaŭ la tutaj de K. Kalocsay,



István Sutka ordigas la librojn

kaj ni havas romanojn, eseojn kaj aliaj poem-volumojn, vojpriskribojn, historiajn librojn, vortarojn kaj librojn pri Esperanto-movadajn temojn k.a. fare de la hungaraj verkistoj. Mi mencias kelkajn nomojn el ili: J. Takács, F. Szilágyi, L. Tárkony, P. Balkányi, A. Pechán, I. Szerdahelyi, L. Kökény, I. Nemere, O. Princz, V. Benczik, Á. Rátkai, B. Wacha, J. Horváth k.a. Aparta kategorio estas la lernolibroj fare de J. Baghy, K. Kalocsay, L. Kökény, F. Szilágyi, I. Nagy, O. Princz, I. Szerdahelyi, J. Mátéffy, J. Polgár k.a. De multaj eksterlandaj aŭtoroj ni ankaŭ havis lernolibron, inter tiuj de L. Zamenhof.

Nia biblioteko havas multajn famajn romanojn en Esperanto, kiel „La tragedio de la homo” de I. Madách,



Vidaĵo el la nova ĉambro

„Quo Vadis” de H. Sienkiewicz, „La Faraono” de B. Prus, „Sklavoj de Dio” de G. Gárdonyi, „Dudek horoj” de F. Sántha, „La mizeruloj” de V. Hugo, „Ĉiela birdo” de Zs. Móricz, „La filoj de la ŝtonkora homo” de M. Jókai, „La knaboj de Paŭlo strato” de F. Molnár ktp. Mi povus vicigi la altvalorajn librojn, kiel la Antologioj kaj Enciklopedioj, kaj aliaj libroj.

Ankaŭ estis ege interesa tralegi tiujn tabelojn, sur kiuj estas vicigite la nomoj de la hungaraj fervojistaj esperantistoj en diversaj tempo-periodoj, la tiamajn buĝetojn, kaj tiujn precizajn priskribojn, kiujn nia karmemora kasisto L. Zseni pretigis. Mi havis emocion, kiam mi legis tiujn nomojn kun kiuj mi kune agadis en la fervojista Esperanto-movado enlande kaj eksterlande, kaj ili jam ne estas inter la vivantoj. Ankaŭ estis malbona rekono, ke antaŭ kelkdek jaroj nia asocio ankoraŭ havis 23 fakgrupojn dise en la lando en



En tiuj skatoloj ni kunportis la paperaĵojn

fervoja medio:



A.Cziboly kaj J.Halász helpis ordigi la materialojn

Tiuj estis: la Centra Fakgrupo Budapeŝt, Fakgrupo en la Fervojdirekcio Budapeŝt, en la Veturilriparejoj Landler, Dunakeszi, Székesfehérvár, Miskolc, Szolnok, en la Veturilriparejoj kaj Fervojdirekcioj Szombathely, Debrecen, en la Fervojdirekcioj Miskolc, Pécs, Szeged, en la stacidomoj Vésztő, Hódmezővásárhely, Kiskunhalas-Kelebia, Győr, Zalaegerszeg, Békéscsaba, Kecskemét, Dombóvár, en la Fervoja Eduka Instituto Kőszeg, en la kulturdomo Miskolc, kaj en la urbo Tata. Nuntempe nia Asocio havas nur sep fakgrupojn (Kelebia-Kiskunhalas, Pécs, Zalaegerszeg, Szombathely, Győr, Debrecen, Budapeŝt-Centra) kaj du kunlaborajn Membro-Asociojn en Miskolc kaj Tata. Antaŭ kelkdek jaroj la nombro de la fervojistaj esperantistoj estis pli ol mil, nuntempe tiu numero estas 450.

Multaj fotoj eternigas la diversajn eventojn – kongresojn, konferencojn, amikajn renkontiĝojn, ĝeneralajn kaj aliajn kunsidojn, klubkunvenojn, komunajn ekskursojn, akceptojn de eksterlandaj kaj enlandaj gastoj, ktp. - kiuj montras la viglan movadan vivon. Precipe multajn fotojn mi trovis pri la 14-a IFEF-kongreso, kaj aliaj IFEF-kongresoj.

Mi tralegis multajn dokumentojn pri la „Landaj Amikaj Renkontiĝoj”. En tiuj estas konservitaj la nomojn de la partoprenantoj, la programojn, la buĝetojn ktp. Interesaj legaĵoj. Entute okazis 46 Renkontiĝoj, kaj ĉefe la paperaĵoj de la unuaj dek Renkontiĝoj estas interesaj. El tiuj dokumentoj ni povus uzi multajn por la skribo de la historio de nia Asocio.

La aliaj interesaĵoj estas la protokoloj de la ĝeneralaj- kaj estrarkunsidoj, la cirkuleroj kaj la laborprogramoj. Ĉiuj kongresaj libroj de la IFEF-kongresoj troveblas en nia biblioteko kun la kongresinsignoj kaj glumarkoj.

Mi povus vicigi la interesaĵojn, kiuj montras la agadon de niaj antaŭuloj. Tamen mi devis multajn dokumentojn



Gy.Gaál kaj M.Zuberecz "laboras"

kaj librojn forĵeti pro la manko de la spaco en la nova ĉambro.

Sekvis la vera translokiĝo per ŝarĝaŭto. Post la translokiĝo ni devis enorde paki en la ŝrankon kaj aliajn ejojn. Tiam jam venis helpi József Halász (Miskolc), István Sutka (Kelebia), Anikó Cziboly (Budapeŝt), Miklós Zuberecz kaj Győző Gaál (Nyíregyháza). Ĉifoje mi dankas la helpon al ili. Do tio estas la historio de nia translokiĝo.

István Gulyás

MONDAJ HEREDAĴOJ EN HUNGARIO

En la 16-an de novembro 1972 Unesko kreis „Mondheredaĵan Kontrakton” por gardi la universalajn kulturajn kaj naturajn



valorojn de la Terglobo. Hungario en 1985 aliĝis al tiu kontrakto. Ĉiu nacio devas flegi sian kulturon, historion kaj tradiciojn, kaj transdoni ilin al la novaj generacioj. Tio estas la esenco de la heredaĵo, kies kono estas nemalhavebla por kompreni la nuntempon, kaj plani la estonton.

Laŭ la kriterio de la kontrakto, la Unesko anigis ĝis nun 940 lokojn de 155 landoj al la listo de la monda heredaĵo. El tiuj estas en la kultura kategorio 727, en naturaj valoraĵoj 185, kaj en la kategorio miksciaj 28. En Hungario troveblas sep kulturaj kaj unu natura heredaĵoj.



La lokoj de la **Kulturaj Heredaĵoj** en Hungario estas:

1./ Budapest: La bordojn de Duna, la kvartalon de la Buda Reĝa Kastelo (en 1987 ricevis ili la honorigan titolon), kaj la avenuo Andrásy (2002).

Rigardante la konstruaĵojn de ambaŭ bordoj de la rivero Duna oni povas sperti la diversajn tempoperiodojn de la historio de la hungara ĉefurbo Budapeŝto. Tio estas unu el la plej belaj vidaĵoj de la mondo. Apartenas al la mondheredaĵo en la flanko de la urboparto Buda kelkaj konstruaĵoj de la Teknika Universitato, la banejo kaj la monto Gellért, la Citadelo, la Liberecstatuo. Sur la flanko de Pest estas la plej grava konstruaĵo la Parlamentejo, kiu estas 268 metrojn longa, kaj ĝi havas 98 metrojn alta kupolon. La placo Roosevelt kun la Hungara Scienca Akademio,



la Palaco Gresham, la hoteloj kaj la tuta riverbordo inter la Lánchíd (Ĉenponto) kaj la ponto Petőfi. La urboparto Buda estas samtempa kun la patrojokupo (986), kaj en la 13-a jarcento komencis evolui, kiam la reĝo IV Béla konstruigis fortikaĵon sur la monteto kontraŭ la tata invado. La reĝa korto translokiĝis al Buda en 1347, kaj tiam komencis la plivastigo de la Palaco. La reĝo Matiaso transformigis ĝin al renesanca palaco. Dum la invado de la turkoj, kaj ĉefe dum la sieĝo de la palaco, ĝi havis grandajn damaĝojn. Budapeŝto estiĝis en 1873 per la unuiĝo de Buda, Óbuda kaj Pest, kaj estis konstruita por ĝi nova kaj reprezentita reĝa palaco. Dum la dua mondmilito la tuta palaco kaj la ĉirkaŭaĵo estis detruitaj, kaj antaŭ kelkaj jaroj oni finis la rekonstruan laboron, sed ankoraŭ kelkajn pli malgrandajn konstruaĵojn devas rekonstrui. Nuntempe la Palaco de la Kastelo de Buda estas la plej grava kultur-

centro de la lando. Tie troviĝas la Muzeo de la Historio de Budapeŝto, la Hungara Nacia Galerio, la Muzeo Ludwig kaj la Széchenyi Nacia Biblioteko.

En la jaro 2002 ricevis la titolon de la mondheredaĵo la avenuo Andrásy kaj ties historia medio en Budapeŝto. La milenuma subtera tramo, kiu estas sub la avenuo, la Placo Heroo kun la Arta Halo kaj Belarta muzeo eĉ la statutoj de la duonarka kolonado, kiuj prezentas la elstarajn hungarajn regnantojn de la historio de Hungario, la Operejo, la Baleta Instituto, la malnova Muzikakademio, kaj la 3-4 etaĝaj eklektikaj kaj neoromancaj konstruaĵoj montras la belecon de tiu avenuo.

2./ Hollókő: La malnova vilaĝo kaj la ĉirkaŭaĵo (1987).



Hollókő situas pr. 100 km-ojn de Budapeŝto en pitoreska regiono inter la montetoj de la montaro Cserhát. La historio de la vilaĝo komenciĝis en la 13-a jarcento, kiam post la tata invado oni konstruis fortikaĵon sur la monto Szár. En la fortikaĵo oni trovis multajn armilrestaĵojn, kanonkuglojn kaj ŝtonskulptadojn, kiujn interesa ekspozicio prezentas. El la fortikaĵo videblas belega panoramo. Mem la malnova vilaĝparto multfoje forbrulis, ĉar ĝis la komenco de la 20-a jarcento la domojn oni kovris per tegmentpajlo. Post tiu granda incendio la domojn oni konstruis el agrilbriko, kaj kovris per tegolo. La vilaĝo havas nur unu pavimeran straton, kie meze staras la malgranda, lignotura, nigra preĝejo. La vilaĝo havas 67 protektatajn konstruaĵojn, kiuj estas karakterizaj kamparanaj domoj.

Oni estigis „Vilaĝmuzeon”, en kiu videblas la elformigo de interno de la domoj, la meblaroj kaj aliaj aranĝadoj, eĉ la uzobjektoj. La variaj muzeoj de la vilaĝo prezentas la kulturon, arkitekturon kaj vestaĵojn de la popolgrupo „Palóc”. Pro la malnovaj kaj bele konservataj loĝdomoj, la diversaj vilaĝaj metiistoj, la folkloro arto en norda Hungario, eĉ la belega ĉirkaŭaĵo ricevis Hollókő la titolon „Monda Heredaĵo”.

3./ Pannonhalma: La miljara benediktana abatejo kaj ĝia natura ĉirkaŭaĵo (1996).

La iama provinco Pannonia donis la nomon al tiu monto (mons Pannonia), sur kiu konstruiĝas la monaĥejo „Sankta Marteno”. Poste la monton oni nomis „Sankta Monto” (mons Sacer). La benediktanan abatejon en la jaro 996 fondis la monarko Géza. La abatejo kontinue evoluis dum la jarmilo en arkitektura strukturo kaj en idea mondo, kaj ankaŭ nun estas la unika ekzemplo de la aktivaj kristanaj monaĥoj, kies monaĥa komunumo kontribuis en la tuta Eŭropo al la evoluado de la kulturo, kaj al la disvolviĝo de la kristanismo. La abatejo kiel historia kunkonstruaĵo montras la diversajn stilojn de la miljara historio de Hungario. Estas okulfrapa intereso, ke en la interna korto la neoklasika fasado kaŝas la mezepokan



parton de la konstruaĵo. Nuntempe pli ol 40 monaĥoj vivas en la monaĥejo, kaj ĉ. 320 lernantoj studas en la mezlernejo de la monaĥejo. La abatejo havas plurcentjaraĝan bibliotekon proksimume kun 350 mil volumoj, inter ili unikaj kaj valoraj libroj, kodeksoj kaj aliaj skribaĵoj, do

ĝi estas unu el la plej riĉaj monaĥejoj bibliotekoj en Eŭropo.

4./ Hortobágy: Nacia Parko – La „Puszta”(1999).



Hortobágy estas la plej granda kontinua natura herbejo en Eŭropo. Tio signifas, ke ĝi ne estiĝis rezulte de senarbarigo aŭ river-regulado. Ĝi havas elstarajn naturajn ecojn, konservante grandan biologian diversecon. Hortobágy estas la unua hungara nacia parko, kiun oni estigis en 1973, kaj ĝi estas la plej granda protektata teritorio de Hungario (82 mil hektaroj). La signifa parto de Hortobágy estas biosfera naturparko, en kiu la indiĝena flaŭro kaj faŭno estas protektataj kaj lasataj en plena libereco. Al la teritorio apartenas la t.n. „Tisza-lago”, en



kiu tri golfoj bone trovis lokon akvobirdoj, fiŝkaptistoj, eĉ akvosportistoj. En Hortobágy vivas 342 specoj da birdoj, el kiuj 152 nestas en tiu. Interesa vidindaĵo estas la aŭtuna tiriĝo de la grupoj, kiu birdo samtempe estas la blazonobirdo de Hortobágy. Multaj dombestoj, ĉefe ŝafoj, bovoj, ĉevaloj kaj porkoj vivas tie. La vizitantoj ensorĉas la lertecon de la ĉevalistoj, la vidindaĵo de la galopaj terciara epoko, do en la mioceno estigitan

ĉevalaroj, kaj – se la vizitantoj havas bonŝancon – la miraĝon, kiam oni vidas tion, kio ne estas tie. Hortobágy havas „Paŝtistan Muzeon”, kaj apud ĝi troveblas la ŝtonponto, kies nomo estas „Naŭtrua Ponto”.

5./ Pécs: Frukristanaj nekropoloj – Sopianae (2000).

En la suda parto de Hungario, ĉe la piedo de la montaro Mecsek situas la urbo Pécs, kiun la romianoj nomis „Sopianae”. La urbo estas kontinue loĝiga ekde la romia epoko, do ekde 2000 jaroj. La klimato, flaŭro, la malnovaj konstruaĵoj kaj la zig-zagaj stratetoj elradias mediteranajn atmosferojn. Ĝi estas unu el la plej gravaj kulturaj centroj de Hungario kun riĉa arta vivo, kun



malnovaj belegaj konstruaĵoj, preĝejoj, muzeoj kaj kun aliaj postrestaĵoj. La urbo estis grava centro de la frua kristanismo, kiun montras la antikvaj romiaj restaĵoj de la prakristana tombejo „Cella septichora”. La mondheredaĵaj lokoj troveblas sude de la katedralo sur la placo Sankta Stefano. Tiu tombejo enhavas 16 tombojn, el kiuj estas viziteblaj kvar tombokelojn: la III, XIX, XX tombokameroj, kaj la kruĉan kripton. La plej altvaloraj partoj de la subtera arkeologia trovejo estas la prakristana maŭzoleo, la sepniĉa prakristana tombokapelo kaj la kripto de Petro-Paŭlo. Multaj murpentraĵoj montras la elstarajn kreitaĵojn de la malfrua romia prakristana arto.

6./ Tokaj: Kulturpejzaĝo de la historia vinprodukta regiono (2002).

La nomo de Tokaj identigas kun la tokaja vino en la mondo. En tiu-ĉi vinregiono situanta en nord-orienta parto de Hungario estis trovita jam en la kvara periodo de la

fosilian vinberfolion, kiu estas konsiderata la komuna praŭlo de la nuntempaj vinber-variantoj. Oni povas diri, ke vinbero fakte estas praklimatiga frukto en la regiono Tokaj. Tiu regiono havas favoran mikroklimaton, specialan vulkanrokaĵ-devenan grundon, favore situantajn deklivojn kaj aŭtunan nebulon kaŭzitaĵoj de la riveroj Bodrog kaj Tisza. La barelojn oni pretigas el kverko, kaj al la maturiĝo de la vino helpas la speciala ŝimo, kiu loksidiĝis sur la muroj de la keloj. Tiu ŝimo helpas la selektoputrado de la vinberoj. Tiuj vinberoj enhavas 850 gramojn da cukero, altan acidon kaj aroman materialon. La rezulto



estas la vino „Tokaja aszú”. Tiun vinon ĝis la lastfoja tempo oni uzis kiel medikamento. Estas interesa, ke la franca reĝo Ludoviko la XIV-a nomis la tokajan vinon „la reĝo de vinoj kaj vino de reĝoj”. La Tokaja vinprodukta regiono havas 27 koloniojn, inter alie Tokaj, Bodrogkeresztúr, Mád, Mezőzombor, Rátka, Szegi, Tarcal, Tállya vinproduktajn lokojn, eĉ en la urbo Sátorajújrhely la kelon Ungvári, kaj en Sárospatak la kelon Rákóczi, kaj en aliaj lokoj kelkajn riĉajn kelojn. Tokaj ricevis la titolon de mondheredaĵo ne nur pro la „Tokaja vino”, sed ankaŭ pro la konservado de la vinber-kaj vinkulturo.

La loko de la **Natura Heredaĵo** en Hungario estas:

1./ Aggtelek: La grotoj de la Aggtelekarsto kaj la Slovaka –karsto (1995).

La komuna Hungara-Slovaka Nacia Parko de Aggtelek en nordorienta Hungario iĝis estab-lita lita en la jaro 1985. La karstsistemo geog-fie rafie formas interrilatan komplekson, kaj ha-as vas 20.170 hektarojn, kie entute troveblas pli ol

ol 900 grotojn, el kiuj 280 malfermiĝas en Hungario. La plej fama estas la Baradla-Domica groto, kiu estas 25 km-ojn longa. El tiu longeco la hungara parto havas 19,4 km-ojn. Pri la groto



unuafoje en 1549 mencias skribado, kaj la detala preskribo aperis nur en 1781. La grotoj donas unikan ekosistemon, kie pli ol 500 specoj de bestoj vivas. En la grotoj troveblas belegaj diversformaj kaj diverskoloraj stalaktitoj kaj stalagmitoj. La arkeologiaj malkovroj trovis multajn trovaĵojn ĉefe el la ŝton- kaj ferepokoj. La groto Baradla havas „Koncerthalon” kun bonega akustiko. Estas kuriozaĵo, ke en la jaro 1962 dum la 14-a IFEF-kongreso tie okazis belega koncerto por la kongresaj ekskursantoj. Pri tiu evento oni metis marmoran memortabulon sur la muro de la grot-koncerthalo.

Rimarko: Sur la listo de kandidatoj de la Monda Heredaĵo troveblas 10 pluaj lokoj en Hungario, kaj komunaj kun najbaraj landoj. Tiuj estas:

- rozmonteta termokarsto en Budapeŝt,
- mezepoka fortikaĵo, kaj la katedralo en Esztergom,
- reĝa restadejo en Visegrád,
- ŝtata virĉevalranĉo en Mezőhegyes,
- Komárom-Komarno fortikaĵo en Hungario kaj Slovakio,
- Ipolytarnóc trovejo de fosilioj kaj piedsignoj de prahistoriaj animaloj,
- pejzaĝa reto en Hungario,
- duoninsulo Tihany kun abetejo, la Tapolca-baseno kun spektataj restaĵoj de bazaltaj vulkanoj, la term-akva lago de Hévíz,
- karpataj lignaj preĝejoj en Hungario, Slovakio kaj Pollando,
- Danubkurbiĝa kulturregiono,

István Gulyás

MESAĜO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO

La 10-an de decembro estas ĉiujare festata kiel la tago de Homaj Rajtoj memore pri la tago en 1948, kiam la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj adoptis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj. Okaze de la ĉijara Tago la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Irina Bokova, publikigis mesaĝon: „Homaj Rajtoj 365”.

La Universala Esperanto Asocio alvokas la Esperanto-organizaĵojn kaj unuopajn esperantistojn vaste diskonigi tiun mesaĝon. Jen la „Mesaĝo”:

„Unesko estis kreita en 1945 por antaŭenigi la kunlaboron per edukado, sciencoj, kulturo, komunikado kaj informado, cele al kreskigo de la reciproka kaj universala respekto de la digno kaj egaleco de ĉiuj virinoj kaj de ĉiuj viroj. Preskaŭ 70 jarojn poste tiu ĉi mandato restas plene aktuala. La progresigo de la homaj rajtoj restas esenca misio, ne nur okaze de la Tago de Homaj Rajtoj, sed ĉiun tagon de la jaro, por ĉiu virino kaj viro ĉie en la mondo. Tion signifas la temo de tiu ĉi tago :”Homaj Rajtoj 365”.

Tiu ĉi mesaĝo estas aparte grava hodiaŭ, kiam la ŝtatoj laboras pri nova monda programo de daŭripova evoluigo por la jaroj post 2015, sin bazante sur la valoroj universalaj de egaleco, justeco, kultura diverseco, paco kaj sekureco. Tiu nova programo devus esti bazita sur la homaj rajtoj, kaj realigita laŭ tiuj, por malaperigi malegalecojn kaj socian ekskluditecon, ĝi devus lukti kontraŭ ekstremismoj, solvi

konfliktojn, kaj konstrui sociojn pli justajn kaj daŭripovajn.

Ĉio tio devas komenciĝi per edukado pri homaj rajtoj. Estas esence instrui la valorojn de respekto, toleremo kaj solidareco por kapabligi la homojn pri la manieroj gvidi sian ekziston, kaj realigi novajn formojn de monda civitaneco. Laŭ tiuj celoj agas Unesko en sia gvida rolo por antaŭenigi kvalitan edukadon por ĉiuj, kaj progresigi ĉie en la mondo la Tutmondan Inicianon por Edukado antaŭ ĉio de la Ĝenerala Sekretario de UN. La homaj rajtoj kaj la edukado al monda civitaneco devas esti la esencaj elementoj de la programo por la jaroj post 2015.

La amaskomunikiloj havas esencan rolon konsciigi la publikon pri homaj rajtoj, kaj lukti kontraŭ antaŭjuĝoj kaj ĝeneraligoj. Tiucele Unesko kunlaboras ekde 2005 kun la Oficejo de la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj pri la Monda programo de Edukado pri Homaj Rajtoj. La tria fazo (2015-2019) de tiu programo enfokusigas la edukadon pri homaj rajtoj por profesiuloj de amaskomunikiloj kaj ĵurnalistoj. Ĉi tiuj celoj gvidas ankaŭ la agadplanon de la Internacia Jardeko de Alproksimiĝo de Kulturoj (2013-2022), kies ĉefa realiganto en la tuta sistemo de Unuiĝintaj Nacioj estas Unesko.

Nun, kiam la mondo rapide ŝanĝiĝas kaj la socioj estas sub premo, mi alvokas la membro-ŝtatojn de Unesko, ĉiujn registarojn kaj la civilan socion, rekonfirmu sian engaĝiĝon pri la homaj rajtoj kiel la fonto, gvidilo al ĉiu ago kaj mezurilo de ĝia sukceso.

Irina Bokova (La red.)

El fervoja mondo

Aŭstrio: **Konstruado de ĉefstacio en Vieno rapide progresas**

Konstruado de nova viena ĉefstacio *Wien Hauptbahnhof* progresas per mejlaj paŝoj. Al du pasaĝerkajoj (9/10 kaj 11/12) jam ekspluatataj por regiona trafiko, ekde nova horaro (14.12.2014) estas regule ekspluatataj restantaj tri (3/4, 5/6 kaj 7/8). Tiuj ĉi tamen ankoraŭ ne estas trapaseblaj ambaŭflanke, sed kunligitaj nur en direkto al stacio *Wien-Meidling*. En orienta direkto (*Ostbahn*) konstruaj laboroj estos daŭrigataj ankaŭ en jaro 2015, kaj trakokunligo de ĉi tiuj kajoj okazos fine de 2015. Ankaŭ en stacio *Wien-Meidling* ekde junio 2014 daŭras konstrulaboroj por trakokunligo direkte al ĉefstacio.

Bulgario: **Eŭropaj miliardoj por riparado de ĉefaj linioj**

Buĝeto por bulgara operacia programo Trafiko kaj trafika infrastrukturo atingas preskaŭ 1,9 miliardojn da eŭroj (inkluzive de mono el naciaj fontoj por kunfinancado). Ĉirkaŭ 70 procentoj estos uzataj por konstruado de fervoja kaj ŝosea infrastrukturo. Evoluon de fervoja infrastrukturo prezentas plecipe riparoj sur linioj *Ruse – Varna, Karnobat – Ŝindel, Plovdiv – Burgas* kaj *Sofio – Septemvri*. El alia eŭropa fonto estos riparataj ankaŭ kontaktlineoj sur linioj *Vidin – Medkovets* kaj *Sofio – Dragoman*.

Eŭropa Unio: **Vartrafikaj koridoroj 1 kaj 2 malfermitaj**

Reprezentantoj de Eŭropa Komisiono, Belgio kaj Nederlando, kaj reprezentantoj de administrado de fervojaj koridoroj la 10-an de marto 2014 kunvenis okaze de solena malfermo de la vartrafikaj koridoroj n-roj 1 kaj 2. La kunvenantoj

akordiĝis pri bezono de plua kunlaboro en sfero de komandosistemo *ERTMS*, pri limigo de bruo, kaj ankaŭ pri sekurigo de vartrajna trafiko tra limpasejoj. Reprezentanto de ĝenerala direkto por trafiko ĉe Eŭropa Komisiono akcentis bezonon de plua harmonigo inkluzive de principo de la antaŭe rezervitaj trajntraceoj.

Francio: **Ekspluatado de longaj trajnkompletoj testata**

Komence de marto 2014 kunvenis en Bruselo fakuloj de EU-membrolandoj por trakti temon de pli longaj kaj pli pezaj trajnkompletoj. Reprezentanto de Francio prezentis aktivadon en projekto *Marathon*. En januaro 2014 tiu ĉi projekto eniris unuan fazon, kaj testado okazis sur fervojlinio inter *Lyon* kaj *Nimes*. Estis testataj tri trajnkompletoj kun po 70 vagonoj. En ili estis instalita teknika aranĝaĵo por komunikado inter ĉefa gvidlokomotivo, sekundaraj lokomotivoj kaj speciale modifita bremsadaparataro.

Francio: **Franca fervojo SNCF sekvas vojon de germana DB**

Entreprenoj de fervoja vartrafiko apartenantaj al konzerno de francaj fervojoj *SNCF* reduktos iom-post-iome siajn malprofitojn. Pri tio estas konvinkita ĉefino de la konzerno *Silvia Charles*. Laŭ ŝi la entreprenoj de post ekonomia krizo 2008/2009 fariĝu strukturataj tiel, ke ili povu denove kreski. Subtenas tion realeco, ke *SNCF* kaj *Geodis* nove organizas valorpaperojn de la transprenitaj entreprenoj en eksterlando. Francaj fervojoj interbatiĝis kun du ĉefaj problemoj: unue kun vasta deindustriigo en Francio, iranta malprofitcele, due kun ĉiam pli multaj klientoj, kiuj forklindis de longtempaj rilatoj al siaj liverantoj de servoj.

Plua plibonigado venos de komuna administrado de fervojaj kaj infrastrukturaj aktivadoj en formo de malferma fervoja

unuiĝo *pool*. Transporto de varoj en Francio en lastaj jaroj suferis pro mankanta akordo inter konstrua agado sur linioreto kaj trafikaj bezonoj.

Germanio: **Media atako de DB pro trajnoj al Londono**

Kiuj trajnoj trafikos sur rekta rapidtrafika trajnkurso inter Germanio kaj Londono? Laŭ DB tio ankoraŭ ne estas solvita. Kaŭzis tion liverado de veturilkombinaĵoj *Velaro D, Class 407* de la firmao *Siemens*, kiuj havas „rajtigan malfruiĝon“. *Andreas Busemann*, fabrikestro en *DB Fernverkehr*, diris al agentejo *Reuters*, ke „ni entute ne rezignis celon pri kunligo al Londono“. *Busemann* aldonis, ke rajtiga procedo pri veturilkombinaĵoj *Class 407* en Francio kaj Belgio montriĝis multe pli malfacila. Li menciis ankaŭ pli altajn kostojn por trafikvojo en Francio.

Italio: **Pli bonaj linioj en Suda Tirolo logas turistojn**

La plej norda itala regiono, Sud-Tirolo, en lastaj ok jaroj grave modernigis sian fervojan infrastrukturon. En jaroj 2000 ĝis 2005 estis realigita ĉefa investo por fini rekonstruon de fervoja linio inter urboj *Merano* (germane *Meran*) kaj *Malles* (germane *Mals*). La linion, sur kiu tutŝtata itala trafikisto *Ferrovie dello Stato* en jaro 1992 ĉesigis ekspluatadon, aĉetis aŭtonomio en *Bolzano* (germane *Bozen*), kaj rekonstruis ĝin. La kompanio *STA*, kiu prizorgis proprajn konstrulaborojn, prizorgis sekve ankaŭ dekdu elektrajn veturilkombinaĵojn de firmao *Stadler*. Rajton por ekspluatado sur renovigita linio sekve ricevis sudtirola kompanio *SAD*.

Italio: **Sur pli sekure ekipita linio trafikos pli multaj novaj veturiloj.**

Por garantii maksimuman sekurecon la linio estas ekipita per aŭtomata blokadsistemo kaj sekurigaj traccirkvitoj. Tio postulas de trakciilkondukisto konfirmi ĉiun ŝanĝon de signalilindiko, enŝaltas aŭtomatan bremsadon, se haltsignalo estas ignorata, flue monitoras rapidon kaj situon de la trajno, kalkultrovas bremsad-diagramon laŭ longo, pezo kaj bremsadforto de la trajno. La veturiloj estas ekipitaj ankaŭ per itala nacia sekurigsistemo, konata kiel *Sistema di Controllo della Marcia del Treno (SCMT)*. Estas tio formo de aŭtomata protekto, kiu monitoras veturtrairon kaj trajnstaton atentige pri stato de signaliloj, maksimume permesita rapido sur la linio ankaŭ depende de tipo de vagono. Tiu ĉi aranĝo permesas al trajnoj veturon sur tutŝtata reto – kaj ebligas ilian uzon kie ajn en la regiono. Ĉiu duvagona kombinaĵo ofertas 104 sidlokojn kaj 124 starlokojn. La vagonoj havas grandajn fenestrojn kaj estas konstrue ekipitaj por faciligi eniron de personoj kun limigita moveblo. Por minimumigi nombron da vandalatakoj estas en vagonoj instalita kamerasistemo.

Danke al sukceso sur la menciita linio, la firmao *SAD* estis alvokita, ke ĝi instalu similajn aranĝojn ankaŭ en valo *Puster* en orienta parto de la regiono, kaj samtempe sur la ĉefa fervojlinio, direktanta al aŭstria landlimo en montpasejo *Brenner*. En publika konkurso *SAD* venkis nacian italan trafikiston. En la valo nun trafikos motorvagon-kombinaĵoj *ETR155* de la firmao *Stadler* kun 162 sidlokoj, kaj *ETR170 Flirt* (ankaŭ de la firmao *Stadler*) kun 258 sidlokoj.

Italio: **Evoluas kunlaboro kun italaj kolegoj.**

Danke al investoj en liniojn kaj veturilojn kreskas nombro de turistoj en trajnoj, kaj samtempe malkreskas nombro de aŭtomobiloj sur ŝoseoj. Por sukceso de revitaligita fervoja

trafiko aldoniĝis ankaŭ tio, ke ĉiuj fervojaj dungitoj venas el la ĉirkaŭaj valoj. Per tio estas garantiita forta motivigo de la homoj, kiuj ŝatas sian laboron, vidas pozitivan efikon por evoluo de la regiono, kaj tiel ili deziras garantii plej bonajn servojn por vojaĝantoj. En estinteco estis entrafikigita nova fervojlinio inter *Bolzano* kaj aŭstra *Innsbruck*. Antaŭ fino de la jaro 2014 sekvos plua linio inter *San Candid* kaj aŭstra *Lienz*. Nuntempaj translimaj kunligoj estas proporcie malmultaj, sed ekzistas espero, ke danke al kunlaboro de itala kaj aŭstra administradoj (kun partopreno de trafikisto *ÖBB Personenverkehr*) nombro da vojaĝantoj denove kreskos.

pasaĝertrafiko en Kataro kaj por kunligo al Saud-Arabio kaj Barejno. „Tiu ĉi projekto havas por ŝtato Kataro strategian signifon kaj prezentas ĝian tutnacian vizion“, diris *Guy Mehula*, prezidanto de la firmao *Parsons*.

Svisio: **SBB: En jaro 2013 ni transportis pli ol unu milionon da pasaĝeroj tage.**

Kompanio *SBB* anoncis rezultojn pri la jaro 2013. En 2013 ĉiun tagon ĝi transportis ĉirkaŭ 1,002 milionojn da pasaĝeroj, kio signifas



Sur la foto: Moderna veturilkombinaĵo *Stadler GTV* direktas al *Mals*.

Kataro: **Internacia fervoja linio kunligos arabajn ŝtatojn**

Komuna entrepreno de du firmaoj – *Parsons* kaj *Systra* – subskribis kontrakton por liverado de konsilservoj por fervoja reto de longdistanca trafiko en Kataro. En planata fervoja reto en amplekso 400 km estos konstruataj sep stacioj por pasaĝertrafiko, ses aranĝaĵoj por vartrafiko kaj unu remizo. La reto servos al var- kaj

plikreskon je 3,7 procentoj kompare al la jaro 2012. Ankaŭ nombro da personkilometroj kreskis je 1,3% kaj atingis 17,8 miliardojn. Pozitivaj nombroj venis plejparte el france parolanta parto de la lando, kie estis plialtigita nombro de la transport-interligoj (ekzemple sur linio *Zürich – Schaffhausen*). Veturkostoj por pasaĝeroj estis plialtigitaj en decembro 2012 mezkvante je 5,2 procentoj. Tio helpis kompensi plialtigon de pagoj por trafika vojo ktp.

Preparis: **Jindřich Tomášek**
Reviziis: **Heinz Hoffmann**



**Gracoplenan Kristnaskon kaj feliĉan Novan Jaron
por ĉiuj karaj legantoj**



**La 67-a kongreso de IFEF okazos de la 16-a ĝis la 23-a de majo
2015 en Ĉinio en la urbo Kunming.
Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.**